

Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by post as newspaper.



La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 114 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Decembro 1929

ESPERANTO.

A concise History of the International Language.

(By Wm. King, D.B.E.A., Secretary
N.Z.E.A., Wellington. N.Z.)

Concluded.

The organisers of the last named Fair circularised by this means 180,000 manufacturers in 71 countries in connection with the fair of this year. Newspapers and periodicals in every country are now devoting space to Esperanto, and radio journals in almost every country are advocating it.

In addition to the various national congresses, there have been held 20 world's congresses of Esperanto, held in different towns. The first took place at Boulogne, in which 688 Esperantists from 20 lands attended, and the last at Antwerp, when over 1500 delegates were present from 35 lands. King Albert of Belgium, who has been interested in Esperanto since 1911, was the patron of the Congress. Such congresses extend over a period of 10 days, and Esperanto is the sole language used. The church, the theatre, and the various sectional and professional gatherings are conducted entirely in Esperanto, and no difficulty is experienced. The Esperanto world has now arranged for the 21st Congress, to be held in Budapest in July and August of this year. In addition to this important congress, the World's Federation of Educational Associations will meet in congress at Geneva in July when, as in the case of the Con-

ference of the World's Touring and Advertising Assoc., held at Frankfurt during Easter, of this year, Esperanto is to be used in the various sessions of the congress and will be the sole translation language.

International organisations and offices are very specially interested in the spreading of an auxiliary language, and Esperanto has been adopted by many of them. Besides those mentioned throughout this statement, the following are among others supporting Esperanto:— The World Union of International Associations, the International Red Cross, the International Pharmaceutical Federation, the Young Men's Christian Assoc. (Y.M.C.A.), the International Women's Suffrage Alliance, the International Bibliographical Institute, the International Federation of Hatters, the International Order of Good Templars Neutral, the International Catholic League, the Catholic International League of Youth, the International Bureau of Freemasons, the International Peace Bureau, the World Union of Women, the International Bureau for the Protection of Aborigines, the International Bureau of Spiritism, the Postal International, the Women's International League of Peace and Freedom, and the International Labor Office.

The Esperanto movement itself has generated the following special organisations:—

The Universal Assoc. of Blind Esperantists, 380 members in 28 lands.

The International Assoc. of Es-

perantist Railwaymen, 630 members with national representatives in 16 countries.

The World's Youth Esperanto Assoc., with national secretaries in 23 lands.

The International Society of Esperantist Lawyers, founded in 1906.

Three Catholic Unions each with its own gazette and members in 30 lands.

International Esperantists' Christian Union, founded in 1913.

World Non-national Assoc., 6000 members in 35 lands.

World's Assoc. of Esperantist Doctors, founded in 1909 and publishing its own gazette.

Esperantists' Literary Association, founded in 1911.

World Assoc. of Esperantist Teachers, 630 members.

World Police League with 58 groups and 3,200 members and own official organ.

International League of Esperantist Post, Telegraph and Telephone Officers, with delegates in 35 lands. Publishes a gazette.

International Radio Assoc., with national secretaries in 26 lands.

International Science Assoc. of Esperantists, founded in 1906.

Scouts' Esperantists' League, founded in 1918 and publishing its official organ "The Scouts' Herald." 500 members.

Esperantists' Sports League.

International Assoc. of Esperantist Stenographers. Publishes the gazette "The International Stenographer."

Theosophical Esperanto League, founded in 1911 and publishing an official organ.

Esperantist League of Vegetarians, founded in 1908.

Although geographically isolated and as far as the life of her people are concerned, coming into direct contact with no country of a different speech, New Zealand has not neglected the international language. For the above-mentioned reasons, the language has not met with the same progress here as it has overseas, but what has been done has been solid. As early as 1904 the pioneers of Esperanto formed a New Zealand Esperanto Association, which held one congress—during the New Zealand Exhibition at Christchurch. This Association became inactive through the War. At Wellington, Feilding, Hamilton, and Whangarei

are delegates of the Universal Esperanto Association, who attend to a large volume of correspondence relating to various matters affecting New Zealand, particularly commercial, touring and national topics. Each delegate is virtually an advertising agent for the Dominion. Four radio-stations have broadcast Esperanto items, the Wellington station (2.Y.A.) in 1927 broadcast a course of 20 lessons in the language. In accordance with the recommendation of the League of Nations, and the authorisation of the Telegraph Union, the Post and Telegraph Department has amended its regulations to permit the acceptance of Esperanto telegrams as a clear language at ordinary rates. Esperanto clubs and societies have functioned at Wellington, Auckland, Christchurch, Hamilton and Master-ton for some time, and recently a club was formed at Dunedin. In January last, in a national conference of Esperantists held at Wellington, the members revived the previous Association and although operating only for a few months, the membership has already reached 150 persons of all ranks. The Prime Minister, Sir Joseph Ward, Sir Robert Stout, and Sir George Fowlds, President of the Auckland University, are patrons of the Association, having supported the language for many years. The movement is at the present time showing steady growth; the newspapers, with a few exceptions, by publishing articles and news regarding the language, contribute in no small way to the stimulation of the public interest in the matter.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitanas pri jenaj fidelulaj abonoj:—

N. R. Mills 4/6, julio, '30; W. McPherson 6/- jano., '31; A. Serpell 4/6, sepo., '30; s-ino R. Bigelow 5/-, sepo., '30; H. Byatt 10/- julio, '30; J. Dobrich k f-ino Ivanus 10/- aŭg., '30 k marto, '30; K. Takahaŝi 10/- junio, '30.

ANGLA LINGVO NETAŬGAS.

Centra Kleriga Fakto de la Vienaj tramistoj decidis forigi de sia instruplano la anglan lingvon pro la malbonaj spertoj akiritaj per tiu ĉi lingvo (la C.Kl.F. elspezis dum la pasintaj jaroj centojn da ŝilingoj por anglaj kursoj—la sukceso estis nula) kaj enkonduki en la instruplanon nur Es-

peranton. Jam dum pasintaj jaroj estis aranĝataj en diversaj remizoj vesperaj E-kursoj, kiuj pro la neregula deĵorado de la tramistoj ne povis havi la deziratan sukceson; sed nun estos la kursoj aranĝataj centre, la C.K.I.F. prizorgos mem la propagandon inter la tramistoj kaj aranĝos teknike la kursojn tiel, ke estu eble al ĉiu kursano viziti la kurson sen interrompo. La C.K.I.F. certe ne faras la aferon pro speciala amo aŭ emo al Esperanto, ĝi ja antaŭe provis la anglan lingvon, sed la fera, malvarma realo montris al ĝi la ĝustan vojon.

SERVICE IN ESPERANTO.

For the first time in W.A. a Divine service in Esperanto took place, in Oct., in the Temperance Hall, Museum street, when Mr. Burt, the president of the Esperanto Congress, addressed a gathering of Esperantists on "La Amo de Dio," and the utility of Esperanto was shown in the treatment of the subject. The speaker pointed out that English did not differentiate between the subjective and the objective genitive—between the love of God for man, and the love which man had for God. He chose many texts to prove that Esperanto gave clearly the meaning which the original intended to convey. Six hymns were sung.

ESPERANTO GUIDE BOOK THROUGH VIENNA

All interested in the Austrian capital are invited to send to „Austria Fremdultrafika Oficejo“, Wien 1., Friedrichstr 7, for its artistic and informative guide book. Of 60 pages, pocket size, illustrated richly with photos., the publication is a striking evidence of the valued support of the Austrian Government. In faultless Esp-o every place worth visiting is described crisply, yet with no omission of an interesting detail. May this venture in the use of Esp-o be justified by a wide response.

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Dec. 12—Fabloj . . . Miss F. Smith
 „ 19—Zamenhof Celebration.
 „ 26—Vacation.
 Jan. 2—Vacation.
 „ 9—La Kvara dimensio de spaco . . . Mr. I. Serishev
 „ 16—Australian Bushrangers—
 Mr. A. Jamieson
 „ 23—Eltrovo de Australia—
 Mr. H. Torr
 „ 30—Conversazione.

GRATULON.

S-ro Wm. McGuigan, Wellington, sukcesis ĉe la unuagrada ekzameno de la B.E.A. Korgratulon!

AN ACCEPTABLE GIFT.

You believe in Esperanto and what it stands for? Pass this copy of "La Suda Kruco" on to your friend; or better still, send to us your friend's name and address, together with 4/6, and we will post to him each copy for the ensuing twelve months.

Both your friend and your Esperanto journal will benefit by your thoughtfulness.

KURSO PER TRADUKADO.

(konduktra de s-ro G. Gordon, F.B.E.A., sek-iino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.)

TRADUKO 4

.. INSULA ĜARDENO EDENA ..
 (daurigata.)

La haveno de Madang estas grandioza verko de la Granda Majstro, kaj la verkanto de la nuna artikolo opinias, ke laŭ beleco kaj sendanĝereco por ŝipoj ĝi konkuras la mondfaman havenon de Sydney, kvankam povas esti, ke ĝi estas malpli granda. En ĝiaj vastaj spacoj de trankvila akvo, sin etendantaj (1) trans kapoj de la ĉeflando, troviĝas oportunaj kaj sendanĝeraj ankrejoj por ŝipoj de dek dumil tonoj (2). Estas certe, ke en tempo de militado en Pacifiko la haveno de Madang havos grandan valoron pro sia sendanĝereco por ŝipoj en ĉiaj veteroj. La kolonio sidas en la vulkana zono, kaj en ĝi iufoje okazas tertremoj, tamen malofte. Konstruita preskaŭ tute el la profito de la eksportado de plumoj de paradizeoj (3) la Madanga kolonieto estas malgranda, malgrava, havanta (1) ĉirkaŭ tridek blankajn loĝantojn (4), kies plimulto sin okupas pri administrado sub la Aŭstralia registaro. En la ĉirkaŭaĵo estas kelkaj negrandaj plantejoj de kokosujoj, kaj tial, ke (5) vaporŝipo alvenas ĉiun trian semajnon, Madang estas komuna centra tenejo por la produktoj de la regiono. Ĝi posedas du tre bonajn ludejojn de laŭteniso, kiuj havigas al la loĝantoj la solan rimedon por amuziĝado. Grandparto de la manĝaĵoj estas el konservaj ladvazoj; glacio, freŝaj viando kaj legomoj estas kelkaj el multaj komfortaĵoj, kiujn tiuj homoj devas malhavi en la plenumado de sia devo en tiu malproksima posteno de la Brita imperio. La tieaj indigenoj similas al la tipo ĉie renkontata (1) en la teritorio laŭ tio, ke ili estas mallaboremaj kaj sen interesoj ekster si (6).

Aŭstralio regas la landon sub mandato de Ligo de Nacioj kaj nomas administranton, sub kiu loĝas en Madang oficejo por kontroli la distrikton. Policanoj varbitaj (1) el la indiĝenaj viroj patrolas la distrikton kaj pli vere pro la admirego (7) de la popolo al la uniformo ol pro ĝia timo aŭ respekto, ili konservas ŝajnon de obeado al la leĝaro kaj bonordon. Inter indiĝenaj fruktoj sin trovas sur la montetoj papajoj (3), "soursops" (8), pandanoj kaj bananoj.

La bestaro (9) de la lando konsistas el tre malmultaj specoj; krokodiloj troviĝas en multaj el la kriktoj (10) kaj manglaj (3) marĉoj. Paradizeoj (3) abundas en malfacile alireblaj partoj de la montetoj kaj rapide plimultiĝas de kiam ili ricevis protekton de rigora leĝo. La distrikto estas iom malbonfama pro malario kaj "blackwater" (nigrakva) febro, sed pro tio, ke (5) la lokaj oficialaj sanistoj bone prizorgas ĝin, malsano estas tre malofta. Pro ĝia sidloko Madang posedas varman, tropikan klimaton, mildigatan (1) de la tradoj (3) kaj estas tolerebla pro sia proksimo de la maro. La pluvado estas tre multa, precipe tia en la malseka sezono, daŭranta (1) de Oktobro ĝis Februaro, kaj malofte pasas tago sen pluvego. (daŭrigota).

NOTARO 4

1. Adjektiva participo. Notaro 1/6—2. "tono." La vorto estas en "Marista Terminaro" de Rollet de l'Isle kaj en la scienca leksikono de Verax, tamen iuj aliaj vortaristoj donas "tuno."—3. Verax.—4. Akuzativo ĉar "ĉirkaŭ" ĉi tie ne estas prepozicio sed signifas "proksimume".—5. "tial, ke" (aŭ "pro tio, ke" aŭ "ĉar").—6. "lotus-eating". Figura esprimo. Vidu Anglan leksikonon.—7. "awe". En la Angla lingvo la vorto havas diversajn nuancojn, kaj en la Esperanta literaturo oni trovas "respekto" (Psa. v. 7), "estimego" (Psa. xxii, 23), "timomiro", "adoradmira" "solena timo", "pia ekstazo".—8. Kiam en Esperanta leksikono ne troviĝas la nomo de iu natura objekto, kaj oni ne trovas la sciencan nomon en Angla leksikono, estas bone nur uzi la Anglan vorton inter citsignoj. Ordinare oni trovas sciencan nomon en la Angla difino en bonaj Anglaj leksikonoj kaj enciklopedioj.—9. Ĉiu vivanta estaĵo, posedanta la kapablon senti kaj sin. movi, estās besto. (Kabe).—10. "creek". La vorto ĉi tie ne havas la Aŭstralian signifon "brook", "small stream," sed la Anglan signifon "inlet of sea."

POINTS IN THE ADVANCE.

Since our last issue we have learned-- That the next Universal Congress of Esp-o. will be held at Oxford in Aug., 1930.

That the famous French literary weekly "Monde" now publishes a half-page in Esp-o. Specimen copy from 50 rue Etienne Marcel, Paris.

That the New Testament can now be had in pocket size from 6d. to 6/-.

Order through A.E.A.

That the membership of the Japanese Esp. Institute is now 2181.

That at Budapest, under Government ægis, 12 days' instruction enabled 70 teachers from various countries to converse with representatives of 34 nations at the Congress.

LETERO EL JAPANUJO.

Jen elĉerpo el ŝatesprime verkita skribo de jap. samprincipano K. Taka-haŝi, Sizuoka.

24/9/29.

..... E-to k malriĉeco ŝajnas esti neapartigeblaj unu de la alia, ne nur ĉe organizaĵoj (NZA ŝajnas fariĝi escepto dank'al la malavareco de la mortinta s-ino Ensom) sed ankaŭ ĉe individuoj. Mi ankoraŭ ne konas iun redaktejon nek sam-on sufiĉe riĉan.

Hodiaŭ mi eltiris de via gazeto (aŭg.n-ro) kelke da linioj en la malsupro de ĝia unua paĝo, t.e., „many an E-tist“, k la tutaĵon de la rimarko de d-ro Marshall, k disdonis al kelkaj amikoj-neesp-istoj, kiuj koncernas la venontan int. teknikan kong.

Hazarde leginte La Nuntempaj Virinoj mi ekridegis. Mi rakontis ĝin al edzino sidanta apud mi. Ŝi diris ke ŝi trovis la saman humoraĵon en iu el niaj gazetoj—eble trad. laŭ la sama originalo.

EL LA HINDA LINGVO.

SIVAGI estas alloga 68-paĝa drameto el la hinduja historio de la deksepa jarcento. La verkinto estas juna hindo, kiu, vizitante Svedujon por studoj, okaze interesiĝis pri Esperanto kaj fervore komencis ĝin studi. Post apenaŭ unujara lernado li nun traveturas Svedujon, farante prelegojn en Esperanto pri sia hejmlando kaj ĝia popolo, tiamaniere propagandante. Kun flamanta entuziasmo li akceptis la mondlingvan ideon kaj ĝian efektiviĝon per Esperanto.

La stilo estas simpla. La aŭtoro studu la radikojn "mistik", "protek". La unua estas religia fakvorto, kaj la

dua ne signifas "sirm'" (de danĝero), "defend'" "gard'", sed "ŝirmi iun per sia rekomendo kaj influo" Kio estas la senco vere de "florumado"? ĉu "plenfloranteco", "floradeco"?

Sivaĝi estas la unua verko de Laksmishwar Sinha, kaj pro neesto de kroma nomo, supozende lia originalaĵo. Ĝin eldonis Eldona Societo Esperanto, Stockholm. Prezo 1.50 Kr.

THE CANBERRA ESPERANTO SOCIETY.

The above Society held its first meeting in the rooms of Messrs Bersten Bros., Civic Centre, Canberra, at 8 o'clock on Tuesday evening, 19th November, at which a number of influential citizens was present.

A set of Rules was discussed and agreed upon, and the election of officers resulted in Major C. L. Clarke being elected President, Messrs. Bersten and R. A. Broinowski, Vice-Presidents; Mr. J. Henry, Hon. Secretary and Treasurer, and Messrs. C. G. Garriock and G. Halle and Miss B. Bevan as Committee.

It was decided to hold the Annual Meeting in June of each year and the Ordinary Meetings on every Tuesday at 8 p.m. each week, and that the annual subscription should be 5/-.

It is evident from the enthusiasm displayed by those present on Tuesday last, that Esperanto will arouse the same public interest in Canberra as it has done in the other Capital Cities of Australia.

KRONIKO.

Auckland, Nov-Zelando. — Daŭra sukceso ĉi-loke farata danke energian laboron de flamaj samprincipanoj. Ĉiusemajnaj disaŭdigoj pri E.-movado k gramatiko, de konversacioj en E-to inter du flulunguloj, k de kantadoj allogas multiujn al la lingvo k ĉi-ties bazideo. Krome, la "Star" aperigas jaŭdade E-an kolonon. Tiomefike estas la propagando, ke ĉi-tiea firmo vendis 2—300 lernolibrojn; je unufoja neokazo de la E-a disaŭdigo el radiejo 1YA, pli ol 300 esplordemandoj riceviĝis ĉe la koncernato, s-ro G. Wheeler!

Klubanoj progresas stude; sepo jam atendas ekzamenan demandaron el Anglujo. La sek-io, s-ro Wheeler, perposte nun instruas ĉ. 80 studulojn en diverspartoj de N.Z.

La NZEA sek-io, s-ro W. King, el Wellington, nin vizitis je 11a de nov. k faris informoplenan paroladon pri E. movado en N.Z. k pri la naci-asocia funkciado.

Christchurch, N.Z.—La 7an de okt. s-ro M. Bell, M.A., priparolis de 3YA "Amikecon inter la nacioj per Esp-o." S-ro Bell ankaŭ traktis pri E-an gramatikon. Plejbone deklaminte E-an poemon, f-ino L. Samms pro tio gajnis havindan premion, donacon de f-ino Saunders. La infanklaso (Stela Rondo) kun ĉ. 30 lern. koraltige donas rezulton al sperta gvido de s-ro A. More.

Melbourne.—Alveninte ĉe Belgrave per vagonaro aŭ aŭtomobiloj, multaj E-tistoj el ambaŭ Melburnaj kluboj, pasigis feliĉan tagon je la 10a de Nov-o. Matene la ekskursanoj amuziĝis per ludoj; tagmeze ili sin regalis per diversaj manĝindaĵoj, kaj poste promenis ĝis Selby por vidi la belan pejzaĝon. Reveninte la domon ili denove festenis babile, kaj poste ekiris hejmen.

La lasta dancado de l'Melburna Societo de la jaro okazis je 4a de Nov. en la halo de la Fervoja Instituto. La afero estis granda sukceso.

Post lia reveno, s-ro P. Hudson donis al membroj du paroladojn pri sia vojaĝo en Hindujo. Li priskribis detale palacojn, templojn kaj aliajn vidindaĵojn, kiujn li vidis, kaj montris al anoj kuriozajn vazojn kaj tranĉilojn.

PERTH—Ŝipestro Claxton, alveninte ĉe Fremantle de Anglujo en sia ŝipo Bonthorpe, vizitis la kunvenejon en sep-o. La Westralia Esperanto Society kore donis al li la manon. S-ro C. faris Esp. paroladon pri la vojaĝo de sia ŝipo k la arto marfiŝojn kapti. Li montris sur kelkajn fotografaĵojn, por ilustru la rakonton. Espereble ni ĝue aŭskultos baldaŭ pluan de nia marista sam-o.

DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

SANA—SANA—SANIGA.

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

S-ro Burt k Mansfield, organizantoj de nia kongreso en Perth, ĉeestis la 26an de sep. S-ro B. sciigis klubanojn pri kongresaferoj.

Anoj horvoĉe bonvenigis nian prezon, s-ron H. Byatt, felice jam resaniĝintan post longa k severa malsano.

Detempe de la klubfondo meznombro alestas la kunvenojn 16 membroj.

N.Z.E.A.

Since its formation in January last, 202 members in 75 localities have been enrolled in the New Zealand Esperanto Association. Below are the names of the towns, etc., in which N.Z.E.A. members are resident. Should any reader desire it, the relative addresses will be supplied by the hon. secretary of the N.Z.E.A. (Mr. Wm. H. King), 119a Kelburn Parade, Wellington:—

Auckland, Balclutha, Christchurch, Cust, Dannevirke, Dargaville, Devonport, Dunedin, East Oxford, Ellerslie, Feilding, Frankton Junction, Glenside, Greymouth, Half-way Bush, Hamilton, Hamilton North, Hastings, Hawarden, Helena Bay, Henderson, Heriot, Hokitika, Huapai, Invercargill, Johnsonville, Kaikoura, Kaipara Flats, Khandallah, Kilbirnie, Kingsland, Lower Hutt, Mangamaire, Maraetai, Masterton, Matamata, Mititai, Morningside, Morrinsville, Mt. Albert, Nelson, Newmarket, New Plymouth, Ngahauranga, Okaihau, Okpioro, Onehunga, Oratia, Oxford, Palmerston North, Parua Bay, Patetonga, Reefton, Riccarton, Ruakaka, Seatoun, Stratford, Taipuhi, Tarras, Taumarere, Tawa Flat, Te Araroa, Te Puke, Teuku Timaru, Tinui, Waihi, Waimate, Waimauku, Wairoa, Waiuku, Wanganui, Wellington, Whangarei, and Willowbridge.

Wellington has the greatest number of members, 32, Auckland being second with 23, Masterton third with 15, Hamilton fourth with 14, and Christchurch fifth with 11. It augurs well that included in the membership, are four M's.P. and 14 schoolteachers.

B.E.S.-a ADRESARO.

For a Swiss franc one may obtain the excellent address book of the Bohema Esperanto-Servo, Poštejn, Ĉeĥoslovakio, which contains over 1000 names and addresses of corresponding E-tists, many of whom are in non-European countries, especially in Egypt. Over 100 portraits grace this booklet of 90 pg. An essential to the "Korespondemulo."

CENZURITAJ!

La ĉi-subaj strofoj ricevis de la hungara registaro forstrekon el la programo Esp.-Kongresa. Pro tio ili sendube havas por legantoj aldonitan intereson. En ili la malsubmetiĝa, libera spirito de la lupo estas favore kontrastata kun la kaŭranta, sklavema de la bonmanĝa hundo.

Kanto De La Hundoj.

A. Peton.

Fajfegas la ventego
Sub peza, nigra nub'
De l' vintro du ĝemeloj:
Frapadas neg' kaj pluv'.
Sed kiom nin koncernas!
La bona grand-sinor'
En kuirej'-angulo
Nin lasas kun favor'.
Pri manĝo ni ne zorgas;
Post lia satmangad'
La niaj estas ĉiuj
Restaĵoj sur la plad'.
Ja vere, ke kelkfoje
Eksonas vipa plaud',
Doloras plaŭdo, sed ja
Sanigas hunda haŭt'.
Kaj se kolero pasis
Nin vokas la Sinjor'
Piedoĵi. liajn lekas
Ni kun feliĉa kor'.

Kanto De La Lupoj.

Fajfegas la ventego
Sub peza, nigra nub'
De l' vintro du ĝemeloj
Frapadas neg' kaj pluv'.
Ni loĝas en la nuda
Dezerto sen defend'
Ne ŝirmas tie nin eĉ
Arbeta branĉotend'.
Ekstere la malvarmo,
Interne la malsat':
Du niaj turmentantoj,
Nin pelas sen kompat'.
Kaj tie, jen la tria:
Pafil' kun kugloŝut'.
Ruĝiĝas blanka neĝo
Per nia sangogut'.
Ni frostas kaj malsatas,
Hurlante pro l' mizer',
Kun kuglo en la flank'...sed
Ni vivas en liber'!

Trad. el la hungara K. de Kalocsay.

MISS ESPERANTO.

Etiology is an interesting science. We now know that Miss Veronika Eksta owes indirectly to the Swedish Prince Charles her title of Miss Esperanto, the most beautiful woman at the Budapest Esperanto Congress.

The prince, as spokesman for the Swedish Esperantists, invited Pastor Andrew Che to Sweden to arrange an Esperanto course for teachers. Che

came, and taught several hundreds in Sweden, then left for Estonia, where the Education Minister, impressed by the Hungarian pastor's astonishing success, invited him to demonstrate his "direct method" in Tallinn. Miss Eksta attended this course, thoroughly learned Esperanto, saved for her first voyage abroad—to the World Congress of Esperanto at Budapest.

She was induced to enter the beauty contest there, in which some 100 girls from 37 countries paraded for the coveted title. She was acclaimed the queen of beauty. Baron Karl Kazy, representing the Ministry, wished to congratulate the girl, but although he spoke German, English, and French, besides his native Hungarian, and although Miss Esperanto could charm in Russian, her mother tongue Estonian, and Esperanto, an interpreter was needed! The baron expressed the conviction that he must learn Esperanto, notwithstanding his ability to discourse in three "world tongues."

BELA JOE.

Jen 310-paĝa eldonaĵo de la BEA, verkita en formo de memrakontita historio de hundo, ironie nomita Bela Joe pro ĝia stumpigita postpendaĵo k fortranĉitaj oreloj. Marshall Saunders, la aŭtoro, konata usona porjunula verkisto, elplumigis la nune recenzatan por konkurso elektonta tiun hundhistorion plejindan alpreni rajton sidi ĉe la jam tiam mondfama ĉevalhistorio Black Beauty (Nigra Belulo). Pli ol miliono da ekz. da Bela Joe, vestitaj per kelkaj lingvoj, jam vendiĝis tra la mondo. La traduko Esp-a estis kunlabore farita de s-ro James Blaikie k rusa samideano N. Hohlov, saĝe imitinda procedo, kiu tamen ĉi-kaze ne faris la cetere facilfluan tradukon aŭ gramatike perferkta aŭ senidiotisma.

La libro alte taŭgas por junuloj, instigas kultivon de bontraktaj rilatoj al bestoj, k entute provizas sufiĉe neĝenan k korektan medion por komencula legpenado. Mi skribis "entute," ĉar pro verŝajna denova eldono ni altiras atenton de la tradukintoj al ĝeno:—

kredi (pensi); aludo (mencio); penseme (enpense); daŭre (permanently, por ĉiam); provi (peni); surmeti (al si); graŭli (ne internacia, kolere plendi); foje (unu fojon); abundo de (da); mi estus pli komforta (estus al mi pli komforte); bedaŭre "surpriz" k "mir" fariĝas sinonimaj; protekti (defendi); oftfoje la estinta verbttempo neĝuste estas uzata anstataŭ la estanta, ekzemple; "mi ne haltis por pensi, ke mi estis (-as) nur hundo"; ĉasi (persekuti); "rab" estigas ideon pri perforto (ŝtel); observi (vidi); lumigita (prilumita); ekzameni (esplori); kontrolbrido ("curb"; neĝusta uzo de kontrol); recit' (deklam); lunde (iun lundon, la lastan lundon?); 176 di vi (?); 198/9, grava eraro estas traduki la anglan "past imperfect" (would do, used to do) per la Esp-a kondiĉa modo -us anstataŭ -adis. Kp. Eliro 18/26. 33/9, "Moses used to..."; havos respondi (devos r.); post ke (p. kiam); daŭrado, stamina, endurance (eltenado); estis estinta (jam antaŭe estis); ĉagrenigi (ĉagreni); "so that," tiel ke (tial); agaci ("irritate" sen-malpacien-cigi, koleretigi, kolerinciti). Iom diskutinde ankaŭ estas certaj uzoj de la korelativoj.

Prezo 3½ ŝil. per AEA aŭ BEA.

—Robo.

PRI H. G. WELLS.

Jam de preskaŭ 35 jaroj fekundpense verkas H. G. Wells, malamiko al ĉia socihipokrito, simpatia interpretisto de la meza sociklaso de Anglujo, unuaranga brita publicisto, kaj profeto de la metalmonstra epoko. Ĉu ni povus tro multe danki al li pro lia "Mr. Britling sees it through" (s-ro B. eltenas ĝis fino), unu el la plej famaj, se ne la unikfama angla romano de la militega tempo? Kiam ni vidos sur la bretoj de nia librejo Esp-ajn tradukojn de liaj "Nevidebla Homo," "La Tempomaŝino" "La Milito de la Mondo," "La Manĉaĵo de la Dioj," kaj tiun kun-sentan priho-studaĵon pri la ŝanĝadanta en viron junulo, "Kipns"?

Lia mirinda verkaro antaŭen-pensa ŝprucas el funda scienca kaj sociologia klerhavo; liaj aŭdacaj skriboj pri la

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertĝinto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE,

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

MELBOURNE.

teologio, el vera spiriteco kaj malesimismo al ĉia tre rigida religiformo. Tamen povas kuŝi ioma vero en la kritiko de iu ankaŭ atentiga verkanto pri la aktuala, dekano Inge, per kio tiu nomas lin frakasisto de historiaĵoj. Ĉu ne vere en sia "Skizo de la Mond-historio" li lasas sin foje aserti tro supraĵe dogmeme?

Li nun havas 63 jarojn. Lia lasta libro, la trivoluma "William Clissold," estis preskaŭ-fiasko ĉe la eldonisto, malgraŭ ke antaŭ dek jaroj liaj verkoj estis inter la plej volont'e aĉetataj. Kial li nun devas konstati pri malmultiĝo de legantoj? Eble pro tio ke lia emo al la politiko k la filozofio jam forpelis el la cerbo-koro la romanistan kapablon. Kiŭ brilas el liaj fruaj verkoj. Liaj lastaj ellaboraĵoj iom tedas, tamen ni esperas, ke antaŭ ol venos la 70a naskiĝdato lia, jam donos li al la mondo pri la nuna tempo k generacio respegulon tian, kia inde levos lin inter la Nemortulojn de la Verkarto.

—Robo.

ORIGINO DE HOMA PAROLO.

Sir Richard Paget, lekcianta antaŭ la Reĝa Instituto de Granda Britujo, klarigis kiamaniere la insektoj kaj bestoj komunikas siajn emociojn unu al alia, kaj kiel la homa parolo ekestiĝis. Li diris, ke la emocia stato estas tre ofte esprimata per sono, kiel ekz., en la amkantoj de la griloj kaj birdoj, kaj en tiuj hurloj, zumbaj, gruntoj, kaj murmuregoj, la ĝojaj bojoj kaj feliĉepoj kiujn ni tiel bone konas en la besta mondo.

Pritraktanta la originon de la homa parolo, la lekcianto diris, ke "la primitiva homo esprimis siajn rudimentajn ideojn kaj intencojn per simpla gestado, pleje per la manoj, sed ankaŭ la korpon li geste uzadis. Sed dum tuta tiu tempo la homo estis evoluiganta siajn artojn kaj manlaboraĵojn. La manoj fariĝis al li ĉiam pli okupataj, kaj li sentis sin pli kaj pli en malfacilo, kiam li, devis peni "paroli kun la manoj plenumaj."

Tute nekonsciante pri tio, li komencis uzi la langon kaj lipojn anstataŭ la manoj. En Eŭropo la pli sude lokitaj gentoj, ĝuantaj pro la klimato sufiĉe facilajn vivojn kaj do pli da manlibereco, ĝis nun ankoraŭ uzas ĉe si multon da siaj mangletoj. La nordaj gentoj, vivantaj laŭ pli rigoraj kondiĉoj, perdis la gestmanieron pro tio ke iliaj manoj ĉiam estis ĉe iu necesa laboro.

La norduloj tial estis devigitaj limigi siajn gestojn preskaŭ tute per la lango kaj lipoj.

El la Angla trad. Robo, Melbourne.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Viceprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. *Write for book list.